EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:32; aŭgusto 26.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: Indiĝenaj popoloj 183 KB. Sume 483 KB

## AMO-seminario pri virina agado en la itala kongreso

Jen la kunligo por spekti la nuran parton de la Itala Kongreso, por kiu ne necesas aliĝo. De la 12:15 UTC de mardo la 27-a. Temas pri Virina Agado, zorge de Małgosia Komarnicka kun mia helpo kaj AMO-Seminario zorge de Małgosia kaj Stefan MacGill kun prelegeto mia pri manĝetiketo en malsamaj kulturoj.
https://us02web.zoom.us/j/83333092541?pwd=rmhg4vauTA1dOgCoSDJmzKJHxBwKnw.1
*ID riunione*: 833 3309 2541; Enirkodo: 470109

Alessandra Madella

## Eŭropo ne kapablas organizi tiajn ekskursojn!



Jen bildo de la ekskursantoj al Ngorongom, sendita de Mirejo Grosjean.

Lige al okazigo de la UK en Aruŝa, la membro de la honora patrona komitato Giorgio Novello, itala ambasadoro en Nederlando, organizis la 23-an de julio iun eventon kun ĉeesto de la tanzania ambasadorino kaj de ambasadoroj el pluraj landoj por ĝin prezenti. La reprezentanto de  UEA estis Louis Wunsch-Rolshoven.

Michela Lipari



***SMG:*** La formo sur la tablotuko estas liu de Tanzanio kun la koloroj de ĝia flago.

## Refoje kurso en Kostariko

La lecionoj pri Esperanto komenciĝis en la Universitato de Kostariko. Ĉi-jare estis pli malfacile plenigi la kurson. Ĝi estis malfermita nur por gestudentoj pri filologio, do la celita publiko estas pli malgranda ol en pasintaj jaroj.

Mi certe partoprenos la Internacian Kongreson de Lingvistoj en Poznano. Je la fino de la jaro, mi planas la jam tradician internacian forumon de la Eo-kurso de la Universitato de Kostariko. Mi invitas vin partopreni, ĝi ja estas granda sukceso, ĉar la gestudentoj povas rekte interŝanĝi kun geesperantistoj; tiu evento lasas profundan kaj pozitivan senton por Esperanto kaj la ĝia kulturo en la koro de la partoprenantoj.

Ekde septembro finiĝos mia periodo kiel direktoro de la Instituto pri Lingvistikaj Esploroj de la Universitato de Kostariko. Mi okupas tiun postenon jam de ok jaroj, ne plu eblas renovigi ĝin. La nova direktorino, d-ino Gabriela Cruz Volio, specialisto pri romanistiko, simpatias kun Esperanto. Ni ambaŭ havas projekton por nova seminario pri Lingvopolitiko, Lingvoplanado kaj Taksado, kiu devos okazi en 2025. Ekde septembro mi komencos kvarjaran periodon kiel direktoro de la Postdiploma Programo pri Lingvistiko (aŭ Programo pri Superaj Lingvistikaj Studoj).

Jorge Antonio Leoni de León,Retpoŝto:apartado.de.antonio@gmail.com; Retpaĝo; http://www.mulkin.info

## Indiĝenaj popoloj havas lingvajn rajtojn!

La 9-a de aŭgusto estis la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo. Bonvolu disvastigi la mesaĝon de UEA je tiu okazo, kiun mi sendas al vi ĉi-kune. Vi rimarkos, ke ni aparte esprimis nian maltrankvilon pri la stato kaj konservo de gepatraj lingvoj, kiuj estas minacataj de la dominado de la grandaj lingvoj. Ni emfazas, ke lingva diverseco povus flori se Esperanto estus pli vaste uzata kiel rimedo de komunikado inter malsamaj lingvaj komunumoj. Hodiaŭ, certaj lingvoj (notinde la angla) dominas en la internacia sfero, tiel kreante ekstreman

malekvilibron inter tiuj kiuj heredis la grandajn lingvojn kaj tiuj kiuj estas kvazaŭ enŝlositaj en minoritata rolo pro la malgrandeco de la influo de iliaj lingvoj.

Humphrey Tonkin

Indiĝenaj popoloj – gazkom (HT)+ afiŝo

## Plia medicina vortaro de UMEA

Pretiĝis la slovena-Esperanta-ukraina versio de la tri-lingva, medicina interpretisto / tradukhelpilo. Dankegon al s-ro Ostoj Kristan kaj s-ino Marjana Komprej! Jam aperis la aldonita PDF-versio sur la retejo de UMEA:

http://umea.fontoj.net/projektoj

Dankegon pro la belega aperigo al D-ro Christoph Klawe, Prezidanto de UMEA!

## Terminaro por rilati kun UN

Mi atentigas vin pri la ekzisto de angla-Esperanta kaj inversa terminaro en nia retejo: https://esperantoporun.org/eo/traduk-terminaro/. La terminaro enhavas iom grandan kolekton de preferataj tradukoj de anglalingvaj UN-terminoj en Esperanton. La terminaro havas longan historion. En la 1970-aj jaroj, kiam niaj kontaktoj kun UN kaj Unesko multiĝis, mi kaj Victor Sadler, la tiama redaktoro de la revuo *Esperanto* kaj poste Ĝenerala Direktoro de UEA, komencis kompili terminaron por tradukantoj de oficialaj dokumentoj. Tra la jaroj tiu terminaro grandiĝis, evoluis kaj fine fariĝis pli-malpli norma. Bedaŭrinde planoj por fari similan terminaron inter Esperanto kaj la franca neniam realiĝis (se estas kandidatoj por tiu tasko, ili anoncu sin!) – sed tiuj Eo-terminoj ja fariĝis ĝenerale uzataj. Bonvolu sekvi la tieajn rekomenditajn formojn. Ekzemple, UN havas "konstantajn" misiojn, ne "permanentajn" kaj ĝi havas "membrajn ŝtatojn". Ni klopodu starigi plej bonajn normojn – sed gravas, ke ni entute havu normojn! Mi jam delonge deziras refreŝigi la terminaron. sed ne kaptis tempon por tion fari. Se ekzistas inter niaj volontuloj homoj kompetentaj pri tio, ili sin anoncu al mi! Mankas amaso da aktualaj terminoj

Humphrey Tonkin

## Pola raportado pri la UK

Jen ligoj al ĉiutagaj dumkongresaj sonraportaj alrigardoj - de Pola RetRadio en Esperanto - al UEA kaj la 109-a UK en Aruŝo.

https://pola-retradio.org/2024/08/e_elsendo-el-la-04-08-2024/
https://pola-retradio.org/2024/08/e_elsendo-el-la-05-08-2024/
https://pola-retradio.org/2024/08/e_elsendo-el-la-06-08-2024/
https://pola-retradio.org/2024/08/e_elsendo-el-la-07-08-2024/
https://pola-retradio.org/2024/08/e_elsendo-el-la-08-08-2024/
https://pola-retradio.org/2024/08/e_elsendo-el-la-09-10-08-2024/

Barbara Pietrzak

## ILEI konigas sin eksteren

La raporto de ILEI pri 2023 aperas en la retejo de Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj.(FILPV), organizo kun kiu ILEI havas bonajn rilatojn jam de jardekoj.

https://fiplv.com/members-2/members-reports/ A lessandra Madella

## El la Kongresa Rezolucio

La kongresanoj konstatas kun kontento, ke la svahila lingvo funkcias kiel supernacia lingvo, kiu ebligas kontaktojn inter loĝantoj de pluraj ŝtatoj en la Orient-Afrika Komunumo (OAK) sen bezono uzi lingvon de iamaj koloniaj imperioj. Ankaŭ ĉiuj aliaj afrikaj lingvoj meritas subtenon kaj necesas agnoski la lingvajn rajtojn de ties parolantoj, aparte en baza edukado, en akordo kun la rekomendoj de Unesko. Tio estas bazo por paco, por pli bona mondo.

Humphrey Tonkin

Estis diskutite en la 109-a UK dum la kunsido de la Amerika Komisiono, ke estus interese, se UEA proksimiĝus al OAŜ (Organizo de Amerikaj Ŝtatoj), kie multe da organizoj de la civila socio jam estas. Interkonsentite kun la komisionestro kaj nia kolego en la Komitato, Guy Matte, mi devos subteni tion. Estas eblo, ke UEA formale registriĝu kiel organizo de la civila socio en OAŜ. Tamen unue indas videbligi nian subtenon al la agado de OAŜ. Jen invito, kiu okazis en la dissendolisto <amerika-komisiono-de-uea@googlegroups.com>.

Temas pri invito de la Amerika Komisiono de UEA al akompano de la Regula Kunsido de la Konstanta Konsilio de OAŜ por pripensi la Manifeston kontraŭ Malriĉeco en Ameriko - detalojn vi trovas en la Eventa Servo de UEA: https://eventaservo.org/e/OAS20240822

Aliaj tiaj informoj devos veni en la menciita listo de la komisiono. Se iu interesiĝas plu aktualiĝi pri tiu temo, tiu bonvenas aliĝi al la listo. Sendu tutblankan mesaĝon al <amerika-komisiono-de-uea+subscribe@googlegroups.com>. Mi aparte kuraĝigas komitatanojn kaj observantojn el amerikaj landoj aliĝi. Via subteno estas grava al ni.

Mi aparte dankas al Guy Matte pro lia diligenta kunordigo de la komisiona agado.

Fernando Maia Jr., **Universala Esperanto-Asocio |** Vicprezidanto

========= vortoj: 1150 =========




Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

### La unuaj tridek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.